Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

La Kolombo de Paco

28-a de julio 2021, numero 16

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

Belartaj konkursoj kaj Tago de Veteranoj fermos la virtualan kongresejon

La virtuala kongresejo (https://vk.retevent.com) funkcios ĝis la 19-a de septembro, dimanĉo. Tio signifas, ke kongresanoj havos ĝis tiam por re-spekti programerojn. Ankaŭ la babilejoj (inkluzive de la vidbabilejoj) funkcios, do kongresanoj povas mem plani uzi ĝin. La vidbabilejoj estas ĉambroj libere uzeblaj, laŭ vikia maniero, tial kongresanoj mem povas zorgi pri ĝia uzado. Tiuj, kiuj ne aliĝis al VK, povas ankoraŭ tion fari per la VK-aliĝilo ĉe https://vk.esperanto.net. Ne plu estas kotizoj por aliĝi al VK, do individuaj membroj de UEA, kiuj ne aliĝis, povas denove aliĝi senpage por spekti la registritajn programerojn, kiuj abundas.

Du specialaj eventoj markos la fermon de la virtuala kongresejo: la Premiceremonio de la Belartaj Konkursoj, kiu okazos la 18-an de septembro, sabaton, kaj la Tago de Veteranoj, la 19-an de septembro, dimanĉon. Ankaŭ pasintjare la Premiceremonio okazis memstare, ekster la VK, kadre de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020). Ĉi-jare ĝi estis elektita por ekfermi la virtualan kongresejon. Ankaŭ la Tago de Veteranoj estas tago inaŭgurita dum MondaFest' 2020, omaĝe al Eduardo Vivancos, tiutempe loĝanta en Kanado kaj kiu en tiu tago centjariĝis en 2020. La intenco de la tago estas omaĝi al la veteranoj de Esperantujo, kaj ĝi denove estos speciala momento en 2021. Ĝis tiam plene ĝuu la virtualan kongresejon!

Aliĝu al la grupo de Amikoj de la Belartaj Konkursoj de UEA ĉe Facebook:
https://www.facebook.com/belartajkonkursoj/

Akiru Belartajn Kolektojn de la antaŭaj jaroj ĉe la Libroservo de UEA:
https://mallonge.net/ge

Esperanto-Ligo en Israelo akiris novan oficejon

Amri Wandel

Post tri-jara serĉado, la 26.07.2021 (tute koincide la internacia tago de Esperanto, markanta la aperon de la Unua Libro en 1887) estis subskribita la kontrakto por la aĉeto de oficejo por Esperanto-Ligo en Israelo. La oficejo troviĝas en la nova oficeja turo Alon2 (finkonstruita en 2017, aldonita bildo), en la komerca koro de Tel-Avivo, 8 minuta promeno de la trajna stacidomo "Ŝalom" kaj kun abundo da trafikaj konektoj (buslinioj kaj estonte la sub-trajno) tuj apude.

La oficejo ebligos al ELI uzi la komunan kunvenejon por kursoj kaj eventuale por la kunvenoj de la Tel-Aviva Esperanto-klubo. Ĝi cetere estas bona investo: pro la pandemio la prezo pagita de ELI estas du trionoj de la prezo antaŭ la pandemio. La serĉadon kondukis la Kasisto Ŝlomo Ŝahar kaj A. Wandel, kiuj ankaŭ subskribis la 135-paĝan kontrakton, kaj la aĉeton akompanis advokato Ram Modan, patro de nia membro Doron Modan. Dankon al ĉiuj kaj gratulojn al ELI!

UMEA-anoj kunvenis dum la VK

Christoph Klawe

Ĵaŭdon, la 22-an de Julio 2021, okazis la tradicia jarkunveno de nia UMEA kadre de la 2-a VK. El la 12 UMEA-anoj, kiuj partoprenis la VK aŭ almenaŭ deklaris sian UMEA-membrecon per la "UMEA-glumarko" ĉe la individua profilo, 7 ĉeestis la jarkunvenon. Ankaŭ kelkaj gastoj interesiĝis pri la jarkunveno kaj venis al la vidbabilejo.

La prezidanto raportis komence pri la stato de la asocio. UMEA havas membrojn en 34 landoj kaj la estraro estas en senpera kontakto kun ĉiuj el ili. Tiel la asocio povas plenumi sian taskon peri kontaktojn inter medicinistaj esperantistoj laŭ bezono. Krome UMEA estas bone informita pri sanrilataj defioj ĉie en la mondo. Bedaŭrinde mankas membroj en Kanado kaj Aŭstralio. La prezidanto atentigis la partoprenantojn de la TEJO-kunsido kadre de la VK, ke ankaŭ medicinstudentoj rajtas aliĝi al nia faka asocio. Li petis la ĉeestantojn varbi por UMEA inter la medicinistoj de iliaj landaj Esperanto-asocioj.

La prezidanto raportis pri la stato de „Medicina Internacia Revuo" (MIR). Ĝi estas per financaj rimedoj kaj eldoniloj oficiale apogita de la Jagielona Universitato en Krakovo, do tiel estas vivanta kontakto inter esperantistoj kaj fama universitato. La lingva politiko de MIR (altkvalitaj sciencaj artikoloj en ajna lingvo kun devigaj resumoj kaj en la angla kaj en Esperanto) estis laŭdita de la ĉeestantoj. La enhava nivelo laŭ impreso de ĉiuj konsiderinde altiĝis dum la lastaj kvin jaroj, kaj sekve universitatanoj eĉ nun fieras montri la kajerojn de MIR al siaj gekolegoj kaj konsideras tiun eblecon bona okazo por varbi por Esperanto. La prezidanto mencias, ke tiu sukceso kaj la baza decido pri la lingva eldonstrategio estas la merito de la ĉefredaktoro de MIR, profesoro Vladimiro Opoka. Tamen estas bedaŭrinda la daŭra manko de artikoloj rekte kaj plene verkitaj en Esperanto. Ĉiu kuracisto ekz. devus esti kapabla je sufiĉe alta scienca nivelo priskribi interesan kazon en Esperanto.

La prezidanto resumis la kunlaboron kun ekstermovadaj instancoj, ekz. „Healthcare Information for All" (HIFA), Monda Medicina Asocio (WMA) k.t.p. kaj la helpon je preparo de interreta kurso pri KOVIM-19 en la retejo de MOS (WHO). Informoj tiurilate troviĝas ankaŭ en la retejo de UMEA.

Malantaŭ la kulisoj la Centra Oficejo de UMEA ĉiutage korespondas kun esperantistoj el la tuta mondo pri sanrilataj demandoj, nuntempe ĉefe ankaŭ pri kuracado de kaj vakcinado kontraŭ KOVIM-19.

UMEA nepre konsideras sin instanco pri medicina terminologio kaj daŭre rekomendas la vortarojn AEMT/EAMT de Yamazoe Saburoo kiel bazon sur tiu tereno.

La prezidanto raportis pri la transdono de la unua diplomo pri „Elstara Lingvoservo en Hospitaloj" (vidu informojn en la UMEA-retejo) kaj instigis sekvi tiun modelon aliloke.

Fine laŭ instigo de Keyhan Sayadpour oni decidis okazigi ne nur ĉiun duan jaron konferencon, sed ankaŭ virtualajn renkontiĝojn pere de ZOOM ĉiun trian monaton. La unua IMEZ do okazos la 23-an de oktobro (http://umea.fontoj.net/aktualajhoj).

Post unuhora prezentado kaj diskuto la kunveno finiĝis.

Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI VEKI 2

VIRTUALA ESPERANTO-KONGRESO ILEI 2021

Programskizo aktuala je 2021-07-26

UTC+2 NL CH de ES ĝis DE																							
01	02	03	04	05	06	07	08	09	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	00
				Kalifornia sunsubiro																	Azia tagiĝo		
UTC + 9 JP KR																							
08	09	10	11	12	13	14	15	16	17	18	19	20	21	22	23	00	01	02	03	04	05	06	07
UTC – 7 USA W																							
16	17	18	19	20	21	22	23	00	01	02	03	04	05	06	07	08	09	10	11	12	13	14	15

Ĉefplado

Verda koloro = aktivaĵoj

Kongresa temo: *Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj*

ILEI retpaĝo: www.ilei.info

Kongresa retejo:
VEKI 2 – La 54-a ILEI-Kongreso (esperantujo.io)

Detala programo en www.eventaservo.org

Sabate, la 7-an de aŭgusto, MALFERMO
Prelegoj de Koutny kaj Charters. Prezento de la kandidatoj al estraraj oficoj.
NACIA VESPERO pri Benino

Dimanĉe, la 8-an de aŭgusto
GRANDA DEBATO: ILEI meze de la Esperanto-Movado
KUNSIDO DE LA KOMITATO
PLANEDA PRIPENSO

Lunde, la 9-an de aŭgusto
GRANDA DEBATO: Tago de indiĝenaj popoloj kaj lingvoj
AMO-SEMINARIO 76: ***Edukado pri / al / per Esperanto-kulturo.***
Prelegoj de Kováts, Corsetti, Grosjean, MacGill, Brazzabeni
Prelegoj de Casini, Garcia, Madella

Marde, la 10-an de aŭgusto
Prelegoj de Tarracchini, Grassini
KUNSIDO DE LA KOMITATO
Prelegoj de Osadchuk, Grosjean

Merkrede, la 11-an de aŭgusto
AMO-SEMINARIO 76: ***Edukado pri / al / per Esperanto-kulturo.***
GRANDA DEBATO: ***kiel efike instrui Esperanton en Afriko***
AMO-SEMINARIO 76*: Edukado pri / al / per Esperanto-kulturo.*
Prelegoj de HORI, BAK, Šmitran, Fischer-Kotowski, André, Borello, Simonini, Belošević, Osadchuk

Ĵaŭde, la 12-an de aŭgusto

SIMPOZIO
Komunikado en multlingvaj edukmedioj – problemoj kaj solvoj
Ĉefpreleganto: Charles Ligan el Benino
Esperanto en supera edukado – mitoj kaj faktoj
Koutny, Rafii, GONGO "Arko", Madella, Binaghi, Borrellol, Burghelea, Garrido, Teyssier, Astori

Vendrede, la 13-an de aŭgusto
SIMPOZIO
Utiloj kaj defioj de neĉeesta lernado kaj instruado
Pancorbo, Bucco Coelho, Corsetti
Survoje al virtuala Esperanto-universitato – inter revo kaj realo
Manzano-Arrondo, Byelongo Isheloke, Tellier
Konkluda diskuto

Sabate, la 14-an de aŭgusto, Konkludo kaj fermo de la ILEI-Kongreso

Premio Deguĉi 2021 al Stefan MacGill

La Premion Onisaburo Deguĉi UEA starigis en la Jubilea Jaro 1987. Ĝi distingas meritajn agantojn, kiuj longtempe laboras per Esperanto, por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de D-ro Zamenhof kaj la instruoj de Onisaburo Deguchi. Spegule al la ideoj de Zamenhof kaj Deguĉi, la premio celas honori tiujn, kiuj pleje kontribuas al la realigo de la bazaj celoj de UEA. Ĝi konsistas el diplomo kaj monsumo de 1000 eŭroj kaj estiĝis de fonduso proponita kaj starigita de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (EPA), faka organizaĵo en kunlaboraj rilatoj kun UEA.

Per decido de la Estraro de UEA, la Premio Deguĉi de la jaro 2021 estas aljuĝita al:

Stefan MacGill

Stefan Clive MacGill naskiĝis la 5-an de oktobro 1948 en Nov-Zelando, tamen ekde 1986 li vivas en Hungario. Stefan lernis Esperanton denaske de sia patro, David MacGill, kiu instigis sian patrinon eklerni la lingvon. Liaj tri filinoj parolas Esperanton; do temas pri kvar-generacia esperantisteco en la familio.

Profesia esperantisto

Stefan studis pri la fako Geografio en Nov-Zelando kaj en 1974 li akiris instruistan diplomon por elementaj lernejoj. En 1976 li translokiĝis al Roterdamo por volontuli en la Centra Oficejo (CO) de UEA. De 1977 ĝis 1986 li laboris kiel oficisto, de 1980 ĝis 1984 kiel Direktoro de la CO. De 1976 ĝis 1986 li estis redaktoro de la Jarlibro de UEA. Krome, de 1978 ĝis 1986 li ankaŭ estis teknika redaktoro de la revuo *Kontakto*. De 1986 ĝis 1996 kaj denove inter 2000 kaj 2013 li redaktis la gazeton Juna Amiko. En 1989 li komencis profesie okupiĝi pri verkado de help-tekstoj por komputilaj programoj; en 2012 li emeritiĝis, sed lia sperto plu speguliĝas en la diversaj gvidiloj, kiujn li daŭre produktas por la Esperanto-movado.

Longjara internacia aganto

Stefan kunfondis la Esperantan Junularan Asocion de Nov-Zelando, en 1964. Li poste prezidis aŭ vicprezidis tri el la plej grandaj Esperanto-organizaĵoj: en 1977 li fariĝis vicprezidanto kaj plue, en 1979 kaj 1980, prezidanto de TEJO. Lia ĉefa projekto dum 1980 estis la realigo de la unua seminario de TEJO, kiu ricevis financan kaj organizan subtenon de la Eŭropa Junulara Fonduso (EJF). Post tiam okazis regule multaj dekoj da subtenataj seminarioj, kiuj kune envenigis al TEJO multajn centojn da miloj da eŭroj. De 1989 ĝis 1992 li estis vicprezidanto de ILEI, de 1992 ĝis 1994 li estis kaj denove inter 2009 kaj 2013 prezidanto de ILEI. Elektita en 2013 Vicprezidanto de UEA, li estis reelektita en 2016 por dua trijara oficperiodo. Inter januaro kaj marto 2017 li ankaŭ estis provizora redaktoro de la revuo Esperanto. En 2019 li estis elektita komitatano C en la Komitato, posteno, kiun li okupos ĝis aŭgusto 2022.

Nemava verkisto

Krom la riĉa agado kiel aktivulo, Stefan ankaŭ estas verkisto: https://mallonge.net/MacGill. Sub lia nomo aperis *Tendaraj Tagoj*, *La Laŭta Vekhorloĝo*, *Tridek Roluloj*, *Streĉ' eĉ, Steĉj-skeĉ'!*, *Pordoj*, *Okulo*, *Nemave Edifi* (FEL, 2007), la teatraĵo *Aŭto-mato* (Beletra Almanako, n-ro 2, 2008) kaj aliaj.

Senlaca organizanto

Ekde la ĉesigo de la papera Jarlibro de UEA en 2019, Stefan okupiĝas pri la arigo de informoj, kiun UEA devus transdoni kiel same per la Jarlibro. Li tenas kontaktojn kun ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj de UEA kaj landaj sekcioj de ILEI kaj TEJO. Pro tiu agado li estis nomumita de la Estraro de UEA komisiito pri Rilatoj kun Membro-organizoj (Landa Agado), laboro, kiun li elstare plenumas. La arigo de informoj rezultigis serion de dokumentoj nomatan Landa Parad', dividitaj laŭ mondopartoj. La aktualaj versioj de tiuj dokumentoj estas en la retejo de UEA Aktivulo.net. Krom tio Stefan ankaŭ agis kiel komisiito pri Aktivula Maturigo (AMO), zorgante pri pluraj dekoj da AMO-seminarioj. Li ankaŭ respondecas pri EKO, serio de komunikoj de la Esperanto-Movado.

… Meritoplena ricevanto de la Premio Deguĉi

Temas pri strukturaj agadoj, kiuj fortigas kaj tenas la reton inter diversaj instancoj de la movado, ekde individuoj ĝis asocioj. Pro tiomaj sindediĉo kaj Esperanto-kariero li estas meritoplena por la Premio Deguĉi.

Noto: enhavo adaptita el la Esperanta Vikipedio: 300 000+ artikoloj en 2021.